Klaus Groth,

Tilioflor'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Endormiga odor'
Nokte flarigas sin;
Estas tilia flor',
Kiu tristigas min.
Pensas vi eble pri
Via florsonĝo, tili'?
Aĥ, estis ŝaŭmo ĝi,
Kaj estas for.

Kantas la najtingal'
En la vesper',
Sonas defore al
Mi la sufer'.
Pensas dumnokte vi
Kiel kortuŝis ĝi?
Aĥ, ja nur melodi'
Estis en ver'.

Traduko de la Germana poemo "Lindenblüte" de Klaus Groth *(∗1819-04-24 – †1899.06-01) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1985-04-18.*

MR-270.3 / Arg-587-1183 (2012-05-16 14:38:11)